


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (822) 3, majo – junio 2000



ESPERANTO: RELIGIO?

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Adolf BURKHARDT, ✉ Gimpelweg 1
DE 73235 Weilheim an der Teck, Germanio;
☎ +49 7023 72413 ✉ Adolf.Burkhardt@t-online.de

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto (kaj matrikulisto): Siegfried KRÜGER,
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €15,-

☛ Membro-subtenanto € 22,- ☛ Nura abono:
pagante rekte al KELI € 12,-; pagante al Libroservo
€ 14,-. Monsendoj de okcidentaj monbiletoj per
registrita letero al la kasisto de KELI ☛ Se estas en
via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de
KELI ☛ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON,
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-
Maupertuis, Francio; ☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@alterm.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!
Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Kompostado, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA,
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 605 305 950; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

- p. 3 **Heroo de historio:**
KAGAWA el Japanio
Kristano, pacisto kaj homamanto
- p. 4 **Dio tra homaranismo**
kaj kristanismo
La religia aspekto de la interna ideo
- p. 6 **Ke ĉiuj estu unu**
Interpreto de la vortoj de Jesuo
- p. 8 **La glora ĉeesto**
Edeno rerakontita
- p. 12 **Blindaj tibetaj infanoj serĉas**
vidantajn okulojn
Evidente daŭre agadas
- p. 14 **Rebriletoj el mia pasinteco**
Eta komentita antologio de Åke AHLRÉN
- p. 20 **Nova vesto, nova revuo? Via revuo!**
Via parto en la plibonigo de la revuo
- p. 24 **La KELI-kongreso en Janské**
Lázně (CZ) jam antaŭ la pordo
Mallonga prezento de la kongresa lando
kaj krome diversaj komentoj, informoj
kaj via krucvortenigo.

Redaktoraj vortoj

Nia liga vivo havas plurajn lokojn. Ili estas nia revuo, nia kongreso, kaj ankaŭ nia eldonado.

Ĉijare ni kongresas solaj, sen niaj katolikaj gefratoj. Tio povus esti bona okazo revivigi la ligan. Ĉu tio okazos? Tion ni povos vidi. Mi esperas tion, sed la aliĝado ne estas tiel esperplena kiel ni povis esperi. Kion fari? Pri tio ni devos diskuti en la kongreso.

Ĉijare nia revuo ŝanĝiĝis. La aspekton

HEROO DE HISTORIO: KAGAWA EL JAPANIO

Frue dum la lasta jarcento kiam Japanio batalis kun Rusio, KAGAWA estis studento ĉe lernejo. Lia instruisto donis fusilon al la knabo. Tuj li jetis ĝin sur la plankon. „*Estas malbona afero ke Japanio militas*” li diris. Pro tio la instruisto frapis lin.

KAGAWA legadis anglan Novan Testamenton por plibonigi sian scion de la angla lingvo. Tie li legis la vortojn de Kristo kaj iĝis kristano, kaj ankaŭ pacisto.

Li estis sperta viro – li estis lingvisto kaj verkisto. Li partoprenis kursojn ĉe kolegio por pastroj. Sed post la kursoj li loĝis en domaĉo en distrikto de la urbeĝo Kobe. Tie li iĝis la espero de la malesperuloj. Kiam li komencis loĝi ĉe la domaĉo, estis Kristnasko. Ekstere li aŭdis la kutiman saluton: „*Gomen nasai, gomen nasai – Permesu min*”. Ĉe la pordo KAGAWA trovis viron kun haŭta malsano. La viro iĝis la

unua de tri viroj kiuj loĝis ĉe la sama domaĉo – proksimume nur 2 metroj-larĝa. Kaj inter la kvar, ili havis nur la studentan monon de KAGAWA.

KAGAWA laboris por plibonigi la socialajn aferojn. Li predikis pri la amo de Dio. Li studis kaj prelegis en Usono, sed poste, li revenis al la malriĉuloj.

Pro la malsana etoso ĉe la domaĉo, unu okulo iĝis blinda. Dum la dua mondmilito, kiel pacisto, la vivo por li iĝis tre malfacila. Sed post la milito, li konsilis la novan registaron de Japanio.

Ĉirkaŭ 1950, li vizitis Brition. Mi aŭskultis lin ĉiam kiam li parolis en mia preĝejo, kaj mi memoras lian perfektan anglan. Malgranda viro, unu okulo, dediĉita al la Regno de Dio.

Peter HAYWARD
Kristana Alvoko, 146, majo 2000

ni decidis en Gliwice. La enhavon decidis vi. Tiun parton de la liga vivo vi povas viv(ig)i eĉ ne partoprenante la kongresan vivon. Rilate tion, nenio plu estas decidenda, nur farenda.

Ĉijare la eldona laboro komune kun la katolikoj, nome *Adoru* alvenas al la ebla fino. Ĉu ĝi ricevas (-is, -os) subtenon? Ŝajne, la eldonistoj de la modernaj kantoj postulas foje multe da mono. Kaj ni bezonas patronojn pri tio. Kiu helpos?

Mi supozas tamen, ke inter ni troviĝas ankoraŭ kelkaj, al kiuj restas iom da tempo, da forto, eĉ da mono, por nia laboro, kies celo tamen restas funde religia, ni ne forgesu tion.

Frate en nia Sinjoro,

Philippe COUSSON

[NDLR]: Tute hazarde, troviĝas en mia persona biblioteko libro de Toyohiko KAGAWA, *Vers une économie fraternelle* (Al frata ekonomio), tiritita el prelegoj faritaj de li en 1936. En tiu verko, li priskribis, klarigis kaj disvolvis siajn ideojn pri ekonomio laŭ la evangelio. Deirante de la konstato pri la ekonomiaj problemoj, pri la eraroj de la diversaj materiismaj sistemoj, li alvenas al sia ideo de **frata ekonomio**. Post trarigardo de la frata amo tra la kristana historio, li alvenas al kooperativa sistemo, kiun li planas etendi al la ŝtata nivelo. Lia lasta ĉapitro titoliĝas „La frata amo, fundamento de la monda paco”.

Philippe COUSSON

DIO TRA HOMARANISMO KAJ KRISTANISMO

Kristanoj sin ĝuste situigu.

Fieron de multaj esperantistoj formas ankaŭ homaranismo, pens- kaj konduk-konceptoj sugestitaj kaj ordigitaj de ZAMENHOF por pli pravigi la neprecon de sia inventaĵo, nome Esperanto. Ni spertu ilin interpreti, komparante ilin kun la valor-konceptoj de kristanoj. Unue, ni rezonu pri Dio.

Laŭ homaranismo Dio estas „mistera forto”, iu ĉiuŝveba energio prikonsiderita pli kiel ordiganta la mondon de la aĵoj kaj de la homaj aspiroj ol kiel la krea kaŭzo de ĉio. Kio estas forto? Ĉu io por si mem aŭ io ne tute sendependa? Laŭ sia klopodo ampleksi ĉiujn religiojn, ZAMENHOF tion ne klarigis. Ĉu ZAMENHOF intencis ekskludi la personecon de Dio?

Por kristanoj Dio, male, estas persono, ĉar Li decidas, volas, savas, juĝas, kreas, ktp.: personaj agoj. Certe, kristano ne pretendas komplete kompreni kaj difini la dian personon: jam eĉ la homa persono rivelas neelĉerpeblajn aspektojn. Kristana filozofoj kaj teologoj parolas pri „analogio” kiam ili aplikas al Dio la koncepton de persono: nome la dia personeco estas io simila, ne tute egala, al homa persono. Necesas ĉi tie forfuĝigi el nia menso kaj imagpovo la fizikan korpecon el tiu koncepto: la homa persono estas knedita super ĉio el inteligento kaj volo kaj libera elektokapablo, la korpo estas io apoga en la koncepto de persono. Male ofte hodiaŭ persono emas indiki prefere la ecojn korpajn.

Tiun sian koncepton pri persono (forto, ktp.) ZAMENHOF certe ne devenigis el la Biblio, kie Dio estas individua persono; tion certe li ne trovis en la kristana aŭ islama medioj, kie havas precizajn nekonfuzebajn trajtojn de persono. Eble li

inspiriĝis el filozofioj *nepersonecaj* aŭ emaj al panteismo same kiel SPINOZA kaj GORDANO BRUNO aŭ eble framasonismo, ktp.; pli probable, li ĝin konstruis kiel mantelon vesteban aŭ kiel komunan denominatoron en kiu kviete loĝu ĉiuj religioj kaj ideologioj.

Direndus ke li, per tiu koncepto, senvole rolis kiel profeto ĉar la hodiaŭaj **New Age** (Nova Epoko) kaj **Next Age** ekzakte tiun vojon laŭiras, kaj ĝuste pro tio ili estas definitive rifuzitaj de kristanoj. Ĉu tiu zamenhofa nocio povas noci la pensmanieron de kristanoj?

Eblas ke kristano ne perceptas tuj la diferencojn inter sia kredo kaj homaranismo ĉar li instinkte legas tiujn formulojn sub kristana lumo: nome, li antaŭe plenplenigas je siaj kredkonceptoj la homaranismajn formulojn kaj poste kontentiĝe ilin retrovas en homaranismo! Sed instruita kristano perceptas tiujn diferencojn kaj rimarkigas la nekongruecon de homaranismo kun sia kredo, kvankam eĉ de ili li povas startigi eventualan dialogon kun diversaj kredoj kaj ideologioj.

Ĉu homaranismo povas damaĝi kristanon? Eble, se li ne konscias pri la afero. Homaranismo, laŭ ne malkleraj opinioj, sugestis kaj gvidis multajn epigonojn de esperantismo, kiuj rilate religiojn, aparte kristanisman, sin tenis per aplomba indulgo aŭ per kompatema supereco se ne per aperta snobeco. Ĉu tia konceptado pri Dio favoris aŭ misfavoris al la amasa aliĝo al Esperanto fare de kristanoj kaj islamanoj...?

Ni nun preparolu la tezojn de homaranismo. Kiuj ili estas?

Kelkaj kalkulas ilin diversnombro kaj di-

versmaniere. El tiuj ĉi brilas konceptoj facilaj, preskaŭ instinktaj kaj riĉaj de bonaj sentoj. Pli ol filozofiaj kaj ideologiaj fundamentoj ni konsideru ĝiajn facilecon kaj akcepteblecon. Neniu kristano sin sentas fremda antaŭ tiuj principoj kaj sindevigoj: respekti ĉiun homon sendepende de distingoj etnaj, lingvaj aŭ religiaj. Pli precize:

— ne sin identigi kun nacio, etno, lingvo aŭ religio. Sindevigo do sin konsideri ne kia apartenanto al iu popolo, sed simple homarano, tio estas ano de la homarano, krom adopti geografiajn nomojn „neŭtralajn”, ne aludantajn al nomoj de gentoj aŭ religioj;

— engaĝo kontribui al supero de konfliktoj inter popoloj konsiderante la homaron unu sola familio.

— rekono pri la rajto de ĉiu homo paroli lingvon aŭ dialekton kaj engaĝo ellerni unu neŭtralan lingvon por komuniki kun homoj de malsamaj lingvoj;

— Dio juĝata pli kiel forto mistera ol persono (ni jam scias tion). Religio duarangita al moralo laŭ la ora regulo: *agu kun aliuloj tiel kiel vi dezirus ke aliaj agu kun vi*, kiu nur ŝajnas kristana; kaj aliaj.

Kvankam tiuj principoj kaj aliaj similaj entenas ion malprecizan (kaj ion pesimisman kaj malprudentan. Ne estas tiu ĉi la momento pravi tion), funde ili povas esti interpretitaj kaj akceptitaj de kristanoj kiel komuna bazo de toleremo kaj kunlaborado, ktp. Sed ankaŭ rilate tiujn principojn kristano disvolvas taskon de plenigo: li pruntedonas ion el siaj ideoj al homaranismo, ĝuste en la momento de la pri ili akceptado kaj subskribado. Kial? Pro tio ke homaranisman ZAMENHOF ne provizis per subkuŝanta rezonata mondkonceptado aŭ historikonceptado (li procedis prefere per instinkta homscienco) kaj pro tio ke kristano trovas en sia kredo la motivojn postulantajn la toleremon, la respekton al homo, ktp. Li scias ke ĉiu homo estas bildo de Dio, amata de Dio, destinita al Dio, elaĉetita de Kristo: do maksimuma valoro. Homaranismo tion ne scias aŭ kredas ke ĝi ne estas bezonata.

Kristano kutimas aliri funden de la problemoj ĉar li ne volas kredi je io racie kaj rivelacie ne fundita. Ĝuste tiu sinteno kondukas rigardi la animon de ĉiu ideologio. Per tiu sinteno pli facilas por li koherigi la konduton al la kondukataj principoj de homaranismo.

Ĉu katoliko vere sin sentas hejme tra la esperanta-zamenhofa mondo? Jes, kondiĉe ke li donu animon novan al esperantismo, animo kiu pravigu ĝin ĉe siaj okuloj. Tiu konscio kaj nepreco estas necesa eĉ en la kazo ke katolika esperantisto aprezu Esperanton kaj flankenlasu homaranisman: fakte ties gutoj povas filtriĝi kaj farbi novan homon nur vage kristanan. Certasence, sed ne tute kontentige, per pli kontentigaj motivoj aplikeblas la kategorio, ĵus albordiĝinta en Esperantio el raŭmaj randoj, de diasporo (Ĉu li mikrosocie diasporus en la makrosocie de esperantistoj diasporantoj?).

Ĉu kristano rifuzas aŭ snobas homaranisman? Tute ne, li ĝin juĝas nesufiĉa el ĝi mem, sed kapabla ricevi komplementon: komplemento foje neglektita aŭ snobita en la esperanta medio.

Armando ZECCHIN
tirita el *Venu kaj Vidu*, 13, marto-aprilo
2000

[NDLR]: Laŭ mia sento, la fakto ke tiun artikolon verkis katoliko ne gravas. Ni povus certe fari la saman analizon, el nia vidpunkto. Mi jam foje diris (skribis?) ke en Esperantismo troviĝas iu eskatologio, kaj ke ĝi esence malsamas kun la biblia. Tiu kvazaŭ-religia aspekto de Esperanto jam kaŭzis, ke pluraj Esperantistoj komplete kaj konscie kabeis post kristaniĝo.

El tiu artikolo, kaj el mia mallonga komento, mi atendas reagojn. Do, ĝis baldaŭ.

P.C.



KE ĈIUJ ESTU UNU

(NOTO: Heinz SCHÜTTE – *Malgranda Ekumena Katekismo / ... ke ĉiuj estu unu ... / stato de ekumeno sojle de la 3a jarmilo*; Villingen 1999, eld. nome de Ekumena Komisiono de IKUE & KELI.)

Jen la titolo de malgranda libreto pri kiu en *Dia Regno* 821 de marto / aprilo 2000 mi legis la — tre rekoneblan — reagon de Martin HOWARD. *Ke ĉiuj estu unu* estas titolo minaca, timiga: legante ĝin oni ja aŭtomate komprenas ke amiko Prokrusto* ne estas plu malproksima. *Ĉiuj estu unu* — ĉiu estu egalaj, samaj, identaj... ĉu ekzistas ideo pli timiga? Granda frato atentis vin!

Ĉiuj estu unu; se tio ne estu minaca, ĉiuj do estu... liberalaj kristanoj, lasante la ceterajn plene liberaj en ilia konscienco; sed mi timas ke ne tion oni intencas, ĉar por multaj homoj la liberaleco ankoraŭ estas miskomprenata, kvazaŭ ĝi ne decus al kristano. Mi ne komprenas tion, ĉar laŭ mi ĝuste la liberala sinteno al kristano pleje decas. Kristanismo, ĉu ne, deorigine ja jam estas iaspeca (eks-)judismo plej liberala: „En Mesio ne plu estas Judo nek Greko, viro nek virino, sklavo nek liberulo”. Kristano, por esti plene kristana, estu liberala! Dogmoj estas katenoj — se oni opinias ilin kredindaj / kredendaj — kaj kiel kristanoj ni estas ja vokitaj „stari en la libero per kiu Mesio nin liberigis”. Do senaj je dogmoj en tia senco.

Feliĉe, se citi remonstrantan kolego-pastoron kiu jam de jaroj instruadas eklezian historion ĉe la teologia fakultato de Leiden: «feliĉe la dogmoj ne apartenas al tiu flanko de nia religio kiu temas pri nia fido (fido estas la centro de kristanismo; fido estas la centro de kiu ajn religio: homoj fidu je Dio!); la dogmoj apartenas nur al la teologia flanko, la pristudada, la pridiskutanta flanko de kristanismo. Dogmojn oni ne fidu, sed diskutu».

Ni ankaŭ ne trotaksu verketojn kiel la ĉi tie cititan... *ke ĉiuj estu unu*... Ja ne temas pri iu oficiala dokumento kiun „la ekumeno” (se ĝi ekzistas...) akceptis. Feliĉe ke ne. Estas nur iu privata verkaĵeto. De romkatolika teologo. Kiu kompreneble agas kaj reagas romkatolike. Lia plena rajto.

Vera ekumeno vivas kaj floras ĉe la bazo, en vivaj renkontiĝoj de homoj diversekleziaj, diverskonfesiaj, eĉ diversreligiaj. Vera ekumeno floras ĉiam pli en komunaj seriozaj interparoloj [sen disputoj, ja kun diskutado respektoplena, serĉante komprenon unu pri la alia]. Vera ekumeno floras kaj vivas en komunaj diservoj, ĉe kiuj oni sin lasas inspiri kaj nutri de Dio mem, la nekaptebla, nedifinebla Fonto de ĉio. Kie oni sin reciproke rekonas kiel homojn en malsamaj tradicioj sed ja en simila serĉado al Dio mem. Nia unu sola Dio.

Ĉe tio mi povus halti. Ĉar efektive, vi jam komprenas mian reagon al la broŝuro... *ke ĉiuj estu unu*... Mi vere ne amas ĝin. Tamen jen kelkaj ege malmultaj detaloj.

La aŭtoro ne prenas sian temon sufiĉe serioze, laŭ mi. „Stato de la ekumeno sojle de la 3a jarmilo” — sed ho ve! mankas komplete la ekumenaj kontaktoj kun judismo, islamo, budhismo, bahaismo, ŝintoismo ktp. kaj tio estas bedaŭrinda ellaso. Kiu ĉeestis — kiel mi — en la grandioza ekumena kunveno de Graz 1997, certe rimarkis ankaŭ ilin. Kaj estonte tiaj kontaktoj fariĝos nur pli gravaj! Eĉ la papo — en sia plena konservativa ortodokseco — organizas ilin foje.

Aliflanke la aŭtoro prenas multe tro serioze kelkajn malnovajn kredkonfesojn de antaŭ multaj jarcentoj, kvazaŭ *tiuj* ankoraŭ povus devo-ligi nin nunulojn. Kredkonfeso, kiel li mem diras [paĝo 9] estas „al kiu mi kredas, kion mi kredas”. Kaj tute leĝeranime de tiu serioza difino li transiras al „Tio

esprimiĝas en la Apostola kaj la Nicea kredkonfeso”. [Mankas la fina -j, ĉar estas du sufiĉe malsamaj tekstoj. Sed tio estas alia temo.]

Jam en la frua 17a jarcento la remonstrantoj komprenis kaj publikigis, ke ĉiam la kredkonfeso ligas absolute senescepte nur tiujn kiuj ĝin verkis [SE entute tia teksto povas ligi iun ajn, ĉar nia kredo kaj nia fido povas ŝanĝiĝi en la vivo]. Kiel pastoro plurfoje mi povis uzi la kredkonfeson de Nicea, okaze de kurso por junuloj kiuj pripensis la eblecon membriĝi en la eklezio. Tion ankaŭ mi faris, kompreneble. Ankaŭ kredkonfesojn de Dorothee SÖLLE kaj aliaj mi uzis. Sed *kion efektive* kredas tia junulo / junulino, kiel li aŭ ŝi *vere fidus je Dio*, tion vortigi povas nur la koncernata persono mem, verkante sian propran kredkonfeson, kiam li aŭ ŝi fariĝas adolta membro de l' eklezio de Kristo. Por tio oni ne bezonas plu kiun ajn praan tekston el fora epoko, kies ĉefa funkciado ĝis nun [ege bedaŭrinde sed ja vere!] estadis nur vekti religiajn kverelojn, malpacojn, tensiojn...

En la libreto mem enestas tiel multe da detaloj, kiuj ne vere taŭgas, misas aŭ ne ekumene akcepteblas, ke ne eblas trakti ilin ĉiujn. Mi taksas ke temas pri plurcent eroj. Foje estas nur malsama opinio. Foje — laŭ mi — historia malĝustaĵo.

Ekzemple kiam je paĝo 5 kardinalo RAZINGER parolas pri tio, ke laŭ li por la unueco inter la kristanoj diversekleziaj „ne necesas pli ol kio estis instruata kaj vivata dum la unua jarmilo”. Tie li klare parolas pri historia fatamorgano: *neniam*, vere *neniam* dum la kristana historio ekzistis tiu stato de unueco. Jam Paŭlo en sia fama la letero al la Korintanoj plendas pri tio, ke por kelkaj gravas la instruado de Kefas [= Petro], por aliaj tiu de Paŭlo, por aliaj tiu de Apolos... Kaj mia farata *Antologio Latina 5* donos tekstojn por tion montri en postaj epokoj. Pensu nur pri grandega parto de la verkoj de Ireneo, Tertuliano kaj Aŭgustino: oftega temo estas atakoj kaj defendoj

kontraŭ kristanoj de alia opinio — kion ili nomas herezuloj. Sufiĉe ironie, Tertuliano, unu el la unuaj grandegaj batalantoj kontraŭ herezo, poste mem estis konsiderata herezulo...

Alia klara neĝustaĵo estas kio „la kristanojn profunde interligas” [paĝo 5] — unue tie venas du dubindaj asertoj:

1) la samaj kredkonfesoj — sed minimume kelkaj eklezioj absolute rekonas nenium kredkonfeson; kaj

2) la komuna Sankta Skribo — sed se ne menciis ke la esprimo Sankta Skribo jam estas kontestata, nepre ne ĉiu biblio identas: romkatolika biblio pli ampleksas ol kalvinana biblio, sed malpli ol grek-ortodoksia biblio. Krom tio

3) la unika bapto — prave; sed gravege mankas tie 3bis) — la Sinjormanĝo / Manĝo de la Sinjoro / eŭkaristio aŭ kiel nomi ĝin: laŭ mi tio estas unu el la plej gravaj komunaj aferoj inter ĉiuj kristanoj; — krome

4) himnaroj — pri tio mi ege dubas sed povas esti ke tie la libreto spegulas la Germanan situacion.

Se la publiko ŝatas pli da ekzemploj, tiujn oni petu. Sed mia intenco ja klaras jam, ĉu ne?

Gerrit BERVELING

* PIV Prokrusto, greke Prokroustès.



LA GLORA ĈEESTO

Biblia rakonto reverkita

Subite ekstaras Virino kaj faligas la duonmanĝitan panon el sia mano. Transe de ŝia vizaĝo estas registrita profunda timo, kia ŝia kunulo neniam antaŭe rimarkis.

— Ĉu — ĉu vi ne vidas? Adamo, ĉu vi ne vidas kion mi vidas?, ŝi diras.

Adamo ekstaras kaj mordas iomete el sia pomo kaj faligas la reston, formaĉanta la kvanteton en sia buŝo, ŝajniganta diri la dudek unuan jarmilan diron, kiu estas: estas malsaĝe forkuri kiam eĉ oni ne ankoraŭ vidas kio forkurigas,

— Kion vi vidas, Virino?

Sed li ne bezonis respondon, li nun mem vidas la alproksimiĝantan profundegan Bribleon, kiu superas tiun de la jam subiranta suno.

— Ho ve, Li venas! Javeo venas por viziti nin.

Li nun tiom timegas kiom Virino.

— Bone ligu vian antaŭtukon, ni devas ekforkuri!

— Ekforkuri! Ekforkuri! Kien ni iros? diras Virino, pli granda timo nun kaptas ŝian koron» Ni jam restas tie ĉi nian tutan vivon, kien do ni iros?

— Ankaŭ mi ne scias, respondas Adamo, sed certe ni devas ekiri. Ni ne povus resti en lia Ĉeesto, ĝi estas tro terura por ni.

La geo forrapidadas de sub la pomarbo kaj nun trovas kaŝejon aliloke en la Ĝardeno...

Ekde nun ili komencas longan forvojaĝon en la malluman mondon. Ili ekas laciĝan aferon en mondo malica. Doloro granda kontraŭstaras ilin. Ankaŭ malsato kaj malbono. Ili disiĝas de la Dia Ĉeesto.

Tamen ili ne disiĝas de la Dia Gloro sen adiaŭa vorto. Kvankam la sono de la vorto aldonas al ilia timo, ĝi tamen antaŭanoncas la esperon de finfina reveno al la varma brakumo de la Sinjoro Javeo kiu nun forsendas ilin. Dum tiu mallonga daŭro de tempo

Javeo skizas programon kiu pre-

nos jarmilojn antaŭ kompleta disvolviĝo. La programo estas kaŝita en simplan juĝistan frazon:

— Kaj mi metas malamikecon inter (la serpento) kaj la virino, kaj inter (la idaro de la serpento) kaj (la idaro de la virino), (la idaro de la virino) frapados (la kapon de la serpento) kaj (la serpento) pikados ĝian kalkanon (Gen 3:15).

Adamo donas al Virino la nomon Eva. Dum la daŭro de ilia vivo la juĝista promeso ne estas plenumita, sed iliaj gefiloj kaj generacioj post ili heredas la promeson. Ili atendas dum jardekoj, jarcentoj kaj jarmiloj; sed la promeso ne estas plenumita. Vere Diaj Programoj ne povas esti iel ajn ŝanĝitaj. Homo devas do atendi.

En la daŭro de tempo, Javeo elektas popolon kaj nomas ĝin la sian. Li deziras montriĝi al ili de tempo al tempo pere de interuloj, por ke oni sciu ke Li ja vivas. Sed antaŭ ol veni al Lia Ĉeesto, ili sanktiĝu, ofte per sango de besto. Tamen, la situacio ne plu estas kiel ĝi estis kiam ili ankoraŭ loĝis en la Ĝardeno Edena: Lia Ĉeesto nun kaŭzas teruran timegon; aŭ pli ĝuste, oni diru, ke ilia konscienco ne permesas, ke ili libere rilatu kun Dio. La kadavroj de la pastroj kiuj ne bone singardas dum vizito al Lia Ĉeesto estas eltiritaj per ĉenoj. Tamen, iu sukcesas ekvidi la Gloran Ĉeeston sen morti, dirante mirindan rakonton pri ĝi:

— Multe da ĝojoj estas antaŭ Vi, ĉarmo estas en Via dekstra mano eterne (Psa 16:11b).

Alifoj, la popolo kiun Javeo amas, deziras sperti Lia Gloran Ĉeeston, Li do ordonis al ili sanktigi sin, sed kiam ili ekvidas Lia Ĉeeston, ili timegas kaj diras al Moseo, la tiama estro:

— Parolu vi kun ni, por ke ni ne mortu (Eliro 20:19).

El la koro de Eŭropo

KONFERENCO PRI ESKATOLOGIO

Komence de novembro 1999 okazis en Praha (Prago) evangelika teologia konferenco organizita de la Evangelika Teologia Seminario kaj de la Evangelika Alianco. La temo estis **eskatologio**. La ĉefa preleganto estis konata reformita teologo Prof. D-ro Jan Milíĉ LOĤMAN, jama profesoro de sistema teologio en la Universitato de Bazelo, kaj ĝia rektoro dum kelkaj jaroj.

Eskatologio apartenas inter kristanoj al temo malfacila kaj kontroversa. En la tria tago de la konferenco aliĝis ankaŭ reprezentantoj de misiaj asocioj, kiuj ĉiujare renkontiĝas kun reprezentantoj de eklezioj kaj serĉas funkci-

Eĉ kiam Li petas ilin konstrui etan skatolon kiu nomiĝas *La Kesto de Interligo*, kaj kiam Li petis ilin konstrui templon, la konstruaĵoj enhavas nur ekbrilon el Lia Gloro, kaj tio ankoraŭ timigas homon. Homo devas do atendi ĝis justa tempo por plenumo de la sankta promeso, farita en la Ĝardeno.

Finfine alvenis la Idaro, kvankam forpasis jarmiloj. La Ĝardeno ne postvivis la promeson, nek la unuaj geuloj, sed ĝi restis firma ĝis la alveno de Jesuo, kio ja estis la plenumo. Li venis morti por ke ni povu reveni kaj resti en la tuto de la Lumo kiu estis estingita el la vojo de homo rezulte de la peko de la unuaj geuloj. Tre rimarkinda afero pri Lia veno estas forŝiro de la vualo kiu ĝis tiam forŝirmis la Gloron for de ni. Ni nun ekvidas la Gloron kaj laŭ tute nova dimensio. Dio ne povas ne akcepti nin ĉar dum Li ekrigardas al ni Li vidas nur la justecon de Kristo per kio ni vestiĝas, kaj do deklaras, ke ni rajtas resti en Lia Glora Ĉeesto, por ekrigardi Lian Riverencindan Gloron, nun sen timo, sed kun riverenco.

Pastoro Olúwábùnmi G. ÒSHÓ-DAVIES

antan modelon de kunlaboro en misiosfero. Esksterordinara gasto estis la nova prezidanto de la Eŭropa Evangelika Alianco, Gordon Rogers SHOWELL, el Britio.

La temoj de la prelegoj estis la jenaj: La Tago de la Eternulo en la Malnova Testamento, Eskatologio de la Dia Regno, Aktiva forto de eskatologio en bohemia reformacio (LOĤMAN), Eskatologio: fonto de espero kaj enradikiĝo de la kristana vivo (LOĤMAN), Hermeneŭtiko de eskatologiaj tekstoj, Perspektivo de misio en Eŭropa kunteksto: ĉu ekzistas espero por Eŭropo? (SHOWELL).

Parto de la konferenco estis seminarioj, diskutoj kun temoj: Kiel taksu signojn de nia tempo?, Kiel prediki je eskatologiaj tekstoj en la Biblio?

Josef POKORNÝ

ESPERANTLINGVA LETERO AL TAIZÉ: ĈU ĜI APERU PLU?

Fine de decembro '99 aperis la elekto el la numeroj 1/99 kaj 4/99 de la *Letero el Taizé*. Nun estas preparata la unua E-lingva eldono por la jaro 2000. Ni deziras plu aperigi tiajn elektojn dufoje jare. Tamen, sorto de la E-lingva „*Letero*“ dependas de la intereso/abonoj. La kotizo varias laŭ lando: por Okcidenteŭropo estas 5 ĝis 7 EUR por du jaroj. Orienteŭropanoj povas ricevi la gazeton forte rabatite. Se vi deziras aboni ĝin, skribu al:

Reinhard PFLÜGER
Deutschherrnufer 45
DE-60594 Frankfurt Germanio
reinhard.pflueger@esperanto.de

Vi ricevos informon, kiom kien pagi, aŭ letere aŭ en la venonta numero.

DIO ĈEESTAS (ELTROVU, ĈU VERAS)

Tio estis la slogano de la kampanjo „Pro-Christ” („por Kristo”), kies kerno estis satelitaj dissendoj el la urbohalo de Bremen, Germanio, al ĉirkaŭ 800 kunvenejoj dum la semajno 2000-03-19 ĝis 25. Ili konsistis precipe el jenaj eroj: kantoj, persona atesto, skeĉo, prediko kaj invito al vivotransdona preĝo. Predikanto estis Ulrich PARZANY [ulriĥ pacani], luterana pastro kaj prezidanto de la germana ligo de la Kristanaj Asocioj de Gejunuloj (nacilingva mallongigo CVJM, internacie plej konata per la angla mallongigo YMCA, esperante KAJV). Laŭ mia persona opinio la skeĉoj estis plej laŭdindaj. La predikoj estis enhance bonaj, sed iom tro longaj kaj tro rapide parolataj. Antaŭ la dissendo ĉiam estis duonhora da loka programo, por ke ne estu nura „kino”. Post fino eblis babili kaj diskuti. Ekzistis similtanaj tradukoj en multajn lingvojn, parte centre, parte surloke. Tio ebligis internacian dissendon, sed ĉefe oni per tio deziris alparoli eksterlandanojn en siaj propraj lingvoj. Je 2000-03-18 estis aparta programo por infanoj. Kvankam ofte oni okazigis la programon en preĝejoj kaj aliaj paroĥaj domoj pro organiza simpleco, laŭeble oni elektis aliajn, pli invito-taŭgajn lokojn, ekzemple kinejojn. Apud tiuj okazaĵoj estas menciinda la afiŝado kaj aliaj manieroj aliri la publikon, kiuj certe plej rekte celis inviti al la supre priskribita programo, sed vere unuavice invitis pensi pri Dio kaj do havis ankaŭ propran valoron. Plej multaj el la paroĥoj, kiuj okazigis la aferon surloke, estis de malgrandaj protestantaj eklezioj, sed partoprenis ankaŭ multaj luteranaj. La ĉefa atingita areo estis la germanlingvaj landoj, krome ekzistis okazejoj en Ĉeĥio, Polio, Kroatio, kaj unuopaj lokoj en aliaj partoj de Eŭropo.

Reinhard PFLÜGER

KARENO EL BIRMO VIZITINTA PARIZON

La 2-an de majo, delegacio de la asocio „Franc-Karena Amikeco” estis akceptita de la pastoroj Jean-Arnold de CLERMONT (*ĵā arnold de klermō*), prezidanto de la Franca Protestanta Federacio, Christian SEYTRE (*kristiā setr*), la sekretario de FPF kaj Etienne LHERMENAULT (*etjen lermenō*), ĝenerala sekretario de la Federacio de la baptistaj Evangelikaj Eklezioj. Ĝi enhavis reprezentanton de la Karena popolo, Isaac PO, loĝistika respondeculo de la KNU (Karena Nacia Unuiĝo, politika organiza estranta la Karenan ŝtaton), kiu venis por pledi la kaŭzon de la etnoj atakitaj de la militista konsilantaro estranta Birmon.

Ek de kiam la Angloj forlasis la landon en 1947, la sendependa Birmo ne plenumis siajn promesojn pri aŭtonomio farita al la etnoj, kaj plurfoje sovaĝe subpreme punis ties provojn pri sendependeco. Tio kondukis parton de la Karenoj rifuĝi al la montoj orientaj, kie ili fondis, en 1950, sendependan ŝtaton nomitan Kawthoolei (*kotule*). Poste, ili starigis kun aliaj etnoj, en 1976, la Nacian Demokratian Fronton (NDF) por sin defendi kontraŭ la elpremadoj de la birma potenco.

De post la 1980-aj jaroj, ili trovis potencon aliancaninon, nome la nobelpremiiton, Aung San Suu Kyi, rekompencita pro ŝia senperforta lukto por demokratio, kaj ŝia zorgo repacigi la regionojn kaj la forte dividitajn etnoj de la lando.

Hodiaŭ, la situacio de ĉi tiu popolo, 7-miliona, restas zorgiga.

Incitata de la birma potenco, kiu profitas la nerektan helpon de la firmao Total, kiu havas interesojn en tiu ĉi regiono, la Karena popolo havas gravajn humanajn bezonojn: nutraĵo por la rifuĝintaj barakaroj, medikamentoj, lernejaj strukturoj, ...



3-A RENKONTIĜO DE ĈEĤAJ KAJ SLOVAKAJ KATOLIKOJ ESPERANTISTOJ

okazos en la tagoj 18.-20.8.2000 en Salezana Domo, Salezianska cesta, Zilina. La renkontiĝo okazos sub la devizo: Eklezio en la 3-a jarmilo. La organizanto estas loka IKUE-grupo en Zilina, Slovakio.

Al la renkontiĝo ni invitas ankaŭ kredantojn de aliaj konfesioj kaj nekredantojn. Bonvenaj estas alilandanoj.

El la programo: Komuna traktado, s-taj mesoj en Esperanto, busa ekskurso, prelegoj je la temo: Eklezio en la 3-a jarmilo, amuza programo. Viajn prelegojn bonvolu proponi, la aliĝilojn kaj la partoprenkotizon bonvolu sendi al:

Vladimir NEMEC, Zvolenska 5,
SK-010 08 ZILINA.

La partoprenkotizo (laŭ la dato de pago — ĝis 30.4; 30.6; surloke):

440 SK, resp. 470 SK, resp. 500 SK
inkluzivas: 2 tranoktojn (160 Sk);
nutradon de vendreda vespermanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo (21, 46, 33);
busan ekskurson kaj organizajn elspezojn.

La aliĝintoj ricevos konfirmilon pri pago kaj pli detalajn informojn. Junularo ĝis 25 jaroj pagas nur 300 SK, resp. 350 SK.

La 1-an Renkontiĝon antaŭ du jaroj en Zilina partoprenis pli ol 60 gefratoj el 4 landoj.

Vlado NEMEC

BONA JARO POR KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Unu el la plej longedaŭraj konstantaj servoj de UEA, Koresponda Servo Mondskala, spertis ioman kreskon de serĉantoj de korespondamiko en la jaro 1999. KSM ricevis entute 428 petojn (419 en 1998).

Rimarkinda kresko kompare kun 1998 estis en Francio (de 70 al 96 petoj), Rusio (de 38 al 56), Belgio (de 6 al 12) kaj Eburia Bordo (de 1 al 12), kaj malkresko en Brazilo (de 59 al 39), Irano (de 22 al 8) kaj Japanio (de 5 al nul). El tiuj ciferoj tamen ne eblas fari fir-

Kio paradokse ege malhelpas la situacion de ĉi tiu popolo, estas ke ĝi rifuzas produkti narkotaĵojn kaj tiri el tio profitojn, kiel faras la aliaj etnoj de la „ora triangulo”.

La efekto de kristanismo certe ne fremdas en tiu kuraĝa elekto, 10 ĝis 15% estas kristanoj, ĉefe baptistoj, sed ankaŭ adventistoj kaj katolikoj.

Etienne LHERMENAULT B.I.P.
trad. P. C.

majn konkludojn, ĉar la ŝanĝoj en unuopaj landoj multe dependas de hazardo.

De tempo al tempo ekz. landaj asocioj provas starigi propran korespondan servon. Tio estas malkonsilinda, ĉar malgranda servo ne povas oferti al la petantoj same vastan elekton kiel KSM nek la kompetenton, kiun havas KSM danke al sia sperto de pli ol 40 jaroj. Por ke ankaŭ tiukampe la limigitaj rimedoj de la Esperanto-movado estu uzataj optimume, estas plej prudente, ke ĉiuj asocioj, instruistoj k.a. kurs-organizantoj uzu la servojn de KSM kaj ke la Esperanto-gazetaro ankoraŭ pli multe diskonigu ilin.

De 1990 KSM estas prizorgata de s-ro François Xavier GILBERT. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj.

Ĉifoje Jacques TUINDER, prezidanto de **Fondaĵo Evidente**, ne vojaĝos kun vi al iu Balkanlando. Ni aviadilo Tibeton, pli precize al la Tibeta Aŭtonoma Regiono (T.A.R.). Ni, kompreneble, ne vizitos ĉi tiun ĉarman landon kiel turistoj!

Ni klopodu vidigi al vi la sorton de infanoj vidhandikapitaj en tiu fora parto de nia mondo, infanoj al kiuj mankas la normala situacio lerni legadon kaj skribadon. Per tio, la ŝanco de ilia integriĝo en la socion malpli ol minimumas. Laŭ oficialaj ciferoj el enloĝantaro de 2 500 000 homoj, pli ol dekmil estas blinduloj. Kompare kun la „cetera” mondo ĉi tiu elpercento draste superas la meznombro. Multas la kaŭzoj de blindeco: cirkonstancoj klimataj kaj higienaj, insektoj, akvo, polvo, fulgo, nesufiĉo de A-vitamins, apenaŭ funkcia publika sano, k.t.p. Oftegas katarakto. La Ruĝa Kruco kaj aliaj organizaĵoj de tempo al tempo okazigas okulkuracajn kampadejojn por operacii kataraktulojn kaj aliajn pacientojn kun vidmalsano. Sed ĉiam restas granda grupo; temas pri tiuj, kies okuloj por ĉiam fermitas. Ĝuste ilin celas la Projekto kiu urĝe petas niajn varman atenton kaj amoplanan helpon.

En la somero de 1997 la blinda Sabriye TENBERKEN (1) esploris la eblojn starigi instruejon por blinduloj en T.A.R. Ŝi malkovris, ke ne ekzistas programoj por instruado al kaj integriĝo de blinduloj. Konsekvence ŝi iniciatis adaptitan projekton por homoj blindaj kaj malforte vidantaj. Komence kunhelpis i.a. loka lernejo. La germana Ministerio por Ekonomia Kunlaboro financis la kurantajn kostojn por dungitaro kaj infanoj dum la unua duonjaro.

Kadre de sia studo Sabriye disvolvis tiel nomatan Tibetan Brajljon. Ĝi kombinis la principojn de la norma brajlo-aboco kun la specialaj kodoj de la tiulanda

silabsistemo. tekstojn legis tibetano, Loden Sherap Daygab Rinpoche, kiu konkludis la skribon tre klara kaj facile komprenebla. „Ĉi tiu skribo povas doni tute novan estontecon al tibetaj blinduloj!” — li diris. Kaj li opiniis, ke Sabriye praktiku kaj praktikigu ĝin.

Ĉi-momente ses infanoj estas instruataj. Helpe de lignaj tabuletoj, provizitaj per glubendaj strioj, oni donas al ili brajloskribajn lecionojn. Tre entuziasmas la infanoj; jam post kelkaj semajnoj, ili plene regas la tri-dek simbolojn de la tibeta aboco.

La Fondaĵo **Antaŭokula Celo**, kiu tre solidaras kun la sorto de vidhandikapitoj en T.A.R., intencas konstrui trejnejon, konsistantan el kvaroj da subprojektoj:

1. Lernejo, provizore por maksimume dudek blindaj infanoj. Ĉiuduonjare kvin novaj infanoj enfluos kaj samtempe kvin foriros por integriĝi en ĝeneralan instruadon. La infanoj aĝas inter sep kaj dek du jaroj.

2. Tibeta brajlopresejo por la produktado de lerno- kaj lego-libroj. Komputilan programon, kiu brajlas nigre skribitajn tibetlingvajn tekstojn, elpensis germana blinda matematikisto Eberhard HAHN. Por la realigo de la presejo responsas la nederlandano Paul KRONENBERG (2).

3. Reintegriĝo. Ĉar Tibeto estas vasta lando kaj multaj lokoj malfacile alireblas, oni decidis venigi la infanojn al Lhasa kaj instrui ilin tie. El vidpunktoj financaj kaj organizaĵaj ne eblas realigi individuajn instruoprogramojn en foraj vilaĝoj. Avantaĝo estas ke blinduloj renkontos samsortanojn, kun kiuj ili povos interŝanĝi spertojn, k.s. Por adekvate helpi al la infanoj oni edukos tiu-celajn specialistojn.

4. Profesia vivo. En kelke da sektoroj homoj vidhandikapitaj povos fari laborojn post periodo de laŭkapabla trejnado: ma-

Kiam zorgo al amatino kondukas al savado de maljunulino kaj ombrelo

Ĉu ni ne foje estas ilo en la manoj de Dio? Mi sentis min tia jam kelkfoje. La lasta okazis antaŭe longe kaj mi volas rakonti al vi mian travivaĵon:

Aleno, je la 24-a de Novembro 1999

Antaŭ ĉio mi savis hodiaŭ unu vivon. Tio okazis en stacidomo Oberkochen, kien mi

saĝo, tibetaj medikamentoj, pulsodiagnozo, akupresuro, homeopatio, brutbredado, farado de laktaĵoj, hortikulturo, manlaboro, tri-kado, teksado, korboplektado, ceramiko, komputilado, k.s.

Fondaĵo **Evidente**, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando, pretas subteni ĉi tiun projekton, esperante ke la esperantistoj esperigos blindajn infanojn, kiuj serĉas niajn okulojn (uea-konto **jajt-s**).

Evidente informas, marto 2000

(1) *Sabriye studis centrajn aziajn sciencojn en la Bonn-a Universitato. Flanke de la Mongola kaj la Ĉina, ŝi lernis modernan kaj klasikan tibetajn lingvojn kombine kun filozofio kaj sociologio. Ĉar ŝi estis la unua kun vidhandikapo kiu entreprenis ĉi tiun studon, ŝi ne povis profiti de alies spertoj. Ŝi sekve devis disvolvi metodon (necesis adapti la brajlosistemon al la tibeta) por realigi siajn idealojn.*

(2) *Paul ekde majo 1998 volontule kunhelpas la porblindulan projekton. Partempe li laboras por la Svisa Ruĝa Kruco. Li estas altnivele edukita teknikisto kaj spertulo sur la kampo de informatiko, komunikado kaj komputilado. Li multe lernis en afrikaj kaj orient-eŭropaj landoj, kie li deĵoris.*

akompanis mian edzinon al trajno. Ŝi devis veturi al speciala malsanulejo por kormal-sanoj en urbo Ulm kaj tra mia cerbo „marŝis” pezaj pensoj pro necerteco, ĉu operacio de koro estos sukcesa aŭ ne.

Je tiu tempo reciprokas tie du trajnoj, ĉar linio estas, krom en stacioj, unutraka. La trajno el direkto de Ulm jam staris en kajo 2 kaj atendis trajnon el direkto de Aalen, kiun mia edzino ankaŭ volus uzi. Kajon du oni ne povas tie atingi per tunelo kaj ŝtupoj, sed nur sur sama nivelo transmarsante la relojn.

Kiam mi jam vidis lokomotivon de Alena trajno alproksimiĝi al kajo 1, mi rimarkis, ke maljunulino, kiu tre malbone iris, volis atingi la trajnon je kajo 2. Mi ankoraŭ diris al mia edzino, ke estas urĝenda tempo pasi trakon 1 kaj mi donis feliĉe atenton al ŝia irado. Ŝi ne atingis kajon 2, sed retrofalis sur sia dorso inter la reloj de kajo 1 kaj kun tremo en vizaĝo atendis sian lastan minuton en vivo. La alvenanta trajno jam veturis eble en distanco de 15 metroj de la falintino. Mi, kiel filo de fervojisto, konis la permanentan signalon haltigi trajnon en akcidenta kazo kaj faris ĝin dume saltante inter la reloj por forŝiri la sinjorinon el la danĝera zono. La lokomotivestro feliĉe vidis mian akcidentsignalon kaj povis ĝustatempe bremsi tutan trajnon kaj staris feliĉe baldaŭ en distanco de 15 metroj eble for de ni.

Kiam mi vertikalis la sinjorinon sur ŝiaj piedoj, ŝi nur havis unu zorgon, ke ŝia ombrelo ankoraŭ kuŝis inter la reloj. Mi diris, unue vi staru firme sur viaj gamboj, poste mi alportos ankaŭ ombrelon. Kun ombrelo, sed pro ŝoko ne dankinte al mi, ŝi atingis sian trajnon. Sed la sukcesa operacio de mia edzino kelkajn horojn poste estis sufiĉa danko al mi.

Karl Heinz SCHAEFFER
Aalen/Germanujo

REBRILETOJ EL MIA PASINTECO

Jam kiel lerneĵano en Stokholmo (Stockholm), mi ŝatis poemojn, precipe niajn klasikajn, sed kiam mi komencis mem ludi per vortoj, rimoj kaj metriko, mi jam delonge forgesis.

Mi esperantiĝis en 1947 pere de mia pliposteja edzino Anna-Lisa, kiun vizitis en la sama jaro lerta nederlanda esperantista paro, bakejposedantoj el Haarlem. Ni ambaŭ reciproke gastis ĉe ili post la Malmö-a Universala Kongreso 1948.

En decembro 1951 mi finfaris la superan ekzamenon. Je tiu tempo min petis Artur WAL-LIN eniri en la himnolaboron, kiun li jam gvidis (Vidu H. A. DE HOOG, *Nia Historio*, p. 126). Temis pri revizio kaj polurado de jam kolektitaj tradukoj de svedlingvaj himnoj kaj religiaj kantoj kaj, se eble, kompletigo per novaj. Mia unua traduko de tiu frua tempo, *Susuras tra la vivbatal'* (*Adoru Kantante* 34), ekestis pro bezono por adventa kunveno de nia loka rondo de KELI.

Dum preskaŭ dudeko da jaroj mi prizorgis la komunan programfolion ESTO de la stokholmaj kluboj: pomonata, normale dupaĝa multobligita afero. Por iom pli kulturigi ĝin mi iam tiam citis erojn el la esperanta literaturo, aŭ kontribuis okaze per propraj versaĵoj.

En retrospekto mi imagas al mi, ke el tiuj laste nomitaj pluraj povus ankoraŭ interesi ankaŭ DR-legantojn nuntempajn. Tial mi kuraĝas prezenti al vi faskon de tiaj, el jaroj longe pasintaj.

Komence kelkaj printempaj:

Marto (1966)

Dum monato marto
pro la printempa starto
plibonis mia farto
post vintra frostkonspir'.
Ĉedome el la neĝo
jam reaperis heĝo
pro venka sunsieĝo
kaj milda vent' zefir'.

Ankoraŭ ne tre brue
printempas tiel frue.
Persiste, frostdetrue,
tamen la alir'.

Aprilo (1959)

Heliĝas taglumo
ekŝvelas burĝonoj
moliĝas la humo
ekkrevas kokonoj
Junhomaj babilas
en dolĉa vespero

kantbirdoj ĝojtrilas
pro svatoprospero

Printempo
printempo
kaprica alarma
Saluton
saluton
sezono plej ĉarma!

Majo (1969)

Viglas ventoj varmaj
eldormiĝas
verdaj vagemuloj
vokas volo novajn
vojojn vidi.

Pro tiamaj aktualaĵoj

Progreso (1958)

Milde luma luno
en eterna juno
teron ĉirkaŭglite

iris tre ermite.

Jam ne monopola
iras lun' izola,
venis la sputnikoj
kiel spacamikoj.

Blua bela spaco
pasis via paco
sekvis romantikon
satelittrafiko.

3 IX 1967

Je ĉi septembra dato
en tuta sveda ŝtato
dekstre sur la strato
ekiris trafikant'.

Stokholmo, urbo kara,
kuŝas nun sen-trama.
Fakto tre amara
por ĉiu tramamant'.

Turismojara jeso
al dekstro kaj progreso.
Tre altis ĝia prezo
por la impostpagant'.

Novjaro (1957)

Nova jaro
al homaro.

Ĉu libero
al sklavaro
kaj sur tero
pacdeklaro?

Ĉu bonfaro
malavara
aŭ
ĉu amaro
senkompara?



La denova plago (1958)

Kritikistoj bedaŭris, el lingva vidpunkto,
la revenon de KALOCSAY al la movado.

Miraklo neprofita
la reaper' subita
el la historio
al la empirio
de akademiano
doktoro Kolomano.

Danĝeras la elito
al lingva mezkvalito.
For stilistoj ruzaj,
brilaj, vortamuzaj!
Forpasu de l' ekrano,
doktoro Kolomano!

*

Malsaĝon vane spitas
eĉ la dioj, mi evitas
tial kontraŭdiron,
salutas vian liron.
Je daŭra via sano,
doktoro Kolomano!

Jubileo (1958)

Kreo en doloro
evoluo pena.
Jubileofloro
post tempopas' konvena.

Velku ne la faro
kun florar' omaĝa.
Instigu festa jaro
al daŭra ir' kuraĝa.

Novjaro (1967)

Baldaŭ ankoraŭ jaro pasis
— nepre senrevene.
Same niaj faroj pasas
sed ne tiel nepre senrevene;
ni gustos iliajn fruktojn,
ĉu dolĉajn, ĉu amarajn...

Åke AHLRÉN

ALFRED H. FRIED

Nobel-premiito de paco kiel Esperanto-aŭtoro

Jam antaŭ la Unua Mondmilito, la aŭstra verkisto kaj Nobel-premiito de 1911 por paco verkis lernolibron de Esperanto, kiu atingis plurajn reldonojn. En sia enkonduko (ni citas el la sesa eldono, aperinta en 1908 en Stuttgart, Franckh'sche Verlagshandlung). Li skribas: „Ke la fervojo malutilas al la komerco kaj endanĝerigas la sanon de la vojaĝantoj kaj de la najbaroj, ke la ideo de ŝipo movata de vaporo estas la fantasmagorio de maniulo, ke la stenografio estas skribo de friponoj, kies studadon oni devas malhelpi, ke la telefono estas nura ludilo, la terpomo diabla frukto kies kultivo alportas riskojn, jen opinioj, kiujn oni iam plenserioze prezentis, tamen ili nun apartenas al la humura ĉapitro de la kultura historio; nun neniu plu subtenas ilin, oni eĉ apenaŭ plu scias, ke ili iam ekzistis. Memorigi pri tiaj opinioj kaj inviti rezistantajn mensojn esti singardaj, apenaŭ ie pli gravas ol en la antaŭparolo al lernolibro de nova mondlingvo. Eĉ la vorto mem estas misfamigita kaj invitas al moko kaj ciniko. Mondlingvo! Al multaj tio sonas kvazaŭ problemo el frenezulejo, kiel la kvadrato de la cirklo, la *perpetuum mobile*, sed almenaŭ kiel tiu de la stirebla aer-ŝipo < piednoto por la sesa eldono: De kiam ĉi tiu enkonduko estis verkita por la unua eldono, tiu „frenezuleja problemo” jam fariĝis realo. Kroma kialo por esti singarda > aŭ la trovo de la norda poluso. Germana satira verkisto skribis: „De kiam Pitagoro, post la eltrovo de sia konata teoremo, brul-oferis hekatombon da bovoj, de tiam ektermas ĉiuj korno-havaj bestoj tuj kiam ie malkovriĝas nova vero.

... Esperanto ne volas forpuŝi la naciajn lingvojn. Ĝi ne volas esti pli ol internacia helpa lingvo, uzota apud la naciaj lingvoj, simile kiel stenografio apud la ordinara skribo. Ĝi ne volas esti pli ol

PROJEKTO „INDIĜENAJ DIALOGOJ”

La projekto „Indiĝenaj Dialogoj” (mal-longigo ID-projekto). En la „Narval-lingvo-instituto” okazis en la dua duonjaro de 1999 du Esperanto-kursoj en la kadro de la projekto „Indiĝenaj Dialogoj” en la vilaĝo Wassenaar apud Hago. La instituto estas profesie laboranta lingvo-instituto kies direktoro estas Esperantisto, S-ro Sylvain LE-LARGE. Pluraj el vi certe legis pri tiu iniciato en la revuo *Esperanto* de UEA.

helpilo en tiuj okazoj, kiam interkompreno ne eblas alimaniere”.

Alfred H. FRIED mortis jam en 1921. Sed la antaŭjuĝoj kontraŭ liaj ideoj postvivis lin. Tamen eble liaj ideoj montriĝos eĉ pli fortaj. UN proklamis la jaron 2000 Internacia Jaro por la Kulturo de Paco.

En sia editorialo en la revuo *Esperanto* (novembro 1999) kun legantoj en 115 landoj, Osmo BULLER memorigas, ke de la komenco la ideo de neŭtrala supernacia lingvo estis ligita kun toleremo kaj kompreneble. Li skribas i.a. „La Esperanta literaturo estas beleto de packulturo. Almenaŭ mi ne trafis en ĝi verkon kiu pravigus perforton aŭ malestime traktas iun popolon. Nia lingva kulturo ne akceptas negativajn esprimojn pri popoloj. Mi povas nomi nekompreneblaĵojn en mia finna lingvo „hebraĵoj” aŭ „ĉinaĵoj”, kaj la germano povas vidi en ĝi „bohemiajn vilaĝojn”, sed por la sennacie neŭtrala Esperanto tia afero estas „volupukaĵo”. Tamen, individuoj malpacas ankaŭ Esperante. Konsciaj aŭ nekonsciaj antaŭjuĝoj ankaŭ inter esperantistoj ne mankas. Ni povas akcepti ke alia popolo estas alia, sed ne ĉiam ke alia homo estas alia. Ni devas ankoraŭ packulturi nin mem. — La Tel-Avivan UK ni dediĉos al diskuto pri „Lingvo kaj kulturo de paco”.

A. BH

Kio estas tiu projekto? La Indiĝenaj Popoloj estas la gardantoj de nemalhaveblaj naturaj kaj kulturaj trezoroj. Ili estas portantoj de saĝeco kaj scio. La terura detruado de ilia vivmedio, lingvoj kaj mondo influas nin ĉiujn. Indiĝenaj Popoloj frontas ĉie en la mondo la samajn minacojn kaj ili devas batali por siaj rajtoj. La „Unuiĝintaj Nacioj” proklamis la jarojn 1995-2004 „la internacia jardeko por la Indiĝenaj Popoloj”. Malmultaj registaroj konsideras ilin kiel samnivelajn partnerojn kaj certe ne respektas iliajn konceptojn aŭ subtenas ilin. Granda nombro da organizaĵoj de Indiĝenaj Popoloj nun kunlaboras en la konstruado de internacia reto kiu devas helpi haltigi la neniigajn procezojn. La Indiĝenaj Popoloj havas limigitan aliron al modernaj komunikiloj kaj pro tio restas la libera komunikado inter ili limigita. La manko de komuna lingvo ankaŭ ludas gravan rolon.

La projekto „Indiĝenaj Dialogoj” celas fortigi la organizaĵojn de Indiĝenaj Popoloj kaj ebligas al ili libere kaj rekte komuniki unu kun la alia pere de modernaj komunikiloj kaj Esperanto. Tiucele la projekto ID organizas trisemajnajn kursojn kun uzo de la plej modernaj instrumentoj. Necesas flue lerni Esperanton, efike uzi retpoŝton kaj fakson. Post reveno hejmen la tasko de la iamaj kursanoj estas enkonduki la uzadon de retpoŝto kaj fakso en siajn organizaĵojn. La projekto estas subtenata de Esperanto-unuiĝoj sed ankaŭ de oficialaj ne-esperanto-organizaĵoj. Dum la pasintaj du kursoj partoprenis reprezentantoj de la Tlingit-a (Alasko), Ŝor-a (Siberio), Mapuĉe-a (Ĉilio), Lumbee-a (Usono), Bumka-a (Kostariko), Masai-a (Kenjo), Dayak-a (Malajzio), Maya-a (Guatamalo), Tuarega (Niĝerlando) kaj aliaj popoloj. Ili mirige progresis kaj baldaŭ jam rete korespondis esperantlingve.

Pluraj Esperantistoj loĝantaj en Nederlando vizitis la kursojn. Laŭdon certe meritigas la instruistoj. Pluraj kursanoj reiris hejmen kunportante komputilon kaj povante

skribi kaj paroli Esperanton. Antaŭ 2005 oni volas eduki 250 personojn. Se vi volas helpi donacante monsumon por la projekto, vi povas transpagi ĝin al la konto „Kampanjo 2000” ĉe UEA menciante „por ID”. La e-poŝtadreso de la instituto estas: <Sylvain.lelage@usa.net>. Poŝtadreso: Narval Instituto, Postbus 1076, 2240 BB Wassenaar.

Els VAN DIJK

„Karnavale” estas la verko de la jaro 1999

La abonantaro de *Literatura Foiro* aljuĝis per referendumo la premion La Verko de la Jaro 1999, ĉi-foje rezervita al poezia libro. Gajnis *Karnavale* de Abel MONTAGUT, eldonita ĉe IEM en Vieno. Gimnazia instruisto, membro de la Kataluna PEN-Centro, Abel MONTAGUT estis la lasta sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj. Li aŭtoris ankaŭ *Poemon de Utnoa*. Ĉi-jare kandidatis nur du pliaj titoloj: *Sur Parnaso* de Timothy Brian CARR kaj *MOSKVARO* de Valentin MELNIKOV, Klara ILUTOVIC, Solomon VYSOKOVSKI kaj *Ocjo DADAEV*. Ilin indikis la membroj de Esperanta PEN-Centro. Ankaŭ en 1997 gajnis poemaro de iberiano, Miguel FERNÁNDEZ. La organizadon prizorgis Sino Mari-Roza VILAIN-DE WOLF, estrino de la konkurfako de LF-koop.

Heroldo komunikas

Bona novaĵo pri Gresillon !

La komisiono pri sekureco kontrolis la plibonigojn (savelirejoj ...) kaj permesis la uzon de la unua etago: do eblos gastoj en la kastelo en la venonta somero.

Henri BOYET

UEA ELDONIS LERNOLIBRON PRI DEMOKRATIO

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David BEETHAM kaj Kevin BOYLE. Ilus. PLANTU. El la angla trad. Geoffrey SUTTON. Rotterdam: UEA 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EUR 9,90.

Post „*Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*” kaj „*Paĉjo, kio estas rasismo?*” UEA eldonis trian libron pri bazaj civitanaj scioj. La verko pri „*Kio estas demokratio?*” de la britaj profesoroj David Beetham kaj Kevin Boyle estas klara kaj facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio, verkita laŭ komisiono de Unesko.

Simile al la pli frua libro pri homaj rajtoj, la lernolibro pri demokratio estas verkita en formo de 80 demandoj kaj respondoj. Ili estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj; demokratia socio; la estonteco de demokratio.

Unuavice la libro celas kontentigi edukon bezonon en landoj, kiuj ĵus komencis enradikigi demokratiajn principojn kaj en kiuj ofte mankas propra tradicio pri ilia praktikado. Tamen, ankaŭ al loĝantoj en landoj kun longaj demokratiaj tradicioj ĝi estas utila legaĵo, ĉar ĝi prezentas interesajn vidpunktojn pri problemoj, kiuj estas temoj de aktuala debato en multaj landoj. La aŭtoroj montras, ke demokratio ne estas unuforma, sed ofte eĉ tre malsamaj solvoj agadmanieroj povas esti aplikataj. Krom doni praktikajn respondojn al konkretaj demandoj, per sia kritika aliro la aŭtoroj instigas demokratian pensmanieron, por ke la leganto sciu orientiĝi ankaŭ en situacioj, kiuj ne estas traktitaj en la libro.

Kiel kutime ĉe eldonaĵoj de UEA, „*Kio estas demokratio?*” havas tre belan grafikan veston, i.a. pro spritaj ilustraĵoj de PLANTU, ĉefdesegnistino de la franca ĵurnalo *Le Monde*.

Gazetaraj komunikoj de UEA
Interredaktore

KANZONFESTIVALO SEN BONA TONO

El la infanaĝo mi memoras pri „Eŭrofestival”, kie el la diversaj eŭropaj landoj artistoj famaj (kaj ne) sin prezentis kun la sukcesaj kanzonoj de la koncerna lingvo. En tiu okazo mi aŭdis unufoje tiom da lingvoj, eĉ la maltan.

Sabaton la 13-an de majo 2000 okazis la „Eŭropa Kanton-Konkurso”, kaj post multaj jaroj mi ree spektis ĝin. Partoprenis 24 landoj. El tiuj, 14 kantis angle (60% de la partoprenantaro) kaj 3 duonangle. Inter la aliaj estis Francio, Belgio, Svislando (ĉifoje, itale), Kroatio, Hispanio kaj Cipro. Eble la idiomo de **Beatles** utilas por ricevi loton. La plej unuaj fakte kantis tute angle (krom Germanio), la plej lastaj nacilingve. Tamen la lastaj vere meritis esti lastaj, sendepende de la lingvo. Cetere, la (svedaj) kondukistoj de la elsendo uzis kaj la anglan kaj la francan, kiel en la 60-aj jaroj.

Demando estas, ĉu la artistoj tradukis siajn partiturojn cele al pli vasta publiko, aŭ ĉu la originaloj mem estas anglalingvaj. Certe tiel okazis por Britio kaj Irlando, sed probable ankaŭ por Rusio: la aŭtoroj estas usonaj kaj la kantistino ja naskiĝis en Rusio, sed loĝas en Britio kaj jam forgesis la rusan.

La respondo estas grava: muzika kulturo multe kontribuas al la naciaj identecoj (multe pli ol okazas por la transnacia, do esperanta identeco). Eble la kanzono de la 21a jarcento bezonos la anglan, same kiel la opero de la 17a kaj 18a jarcentoj bezonis la italan.

Noor WEG
Interredaktore

VIZITO AL LA UNUA PREZIDANTO DE KELI

Kista (Stockholm), Decembro 1999.

Alproksimiĝas nova jarcento, eĉ jarmilo kaj oni do pensas reen al pasintaj tagoj kaj tempoj. Dum 63 jaroj en Esperantujo mi kompreneble travivis multon interesan, korespondis kun multaj kaj ankaŭ renkontis multajn el ili.

Mi volas rakonti pri unu tia renkontiĝo antaŭ iom pli ol 30 jaroj. Mi partoprenis la unuan kongreson komunan de KELI kaj IKUE en Limburg an der Lahn en la jaro 1968. Ne pri tiu kongreso mem mi volas rakonti. Tio certe estis farita jam tiam. Sed post la kongres-fino Maria HANSEN, Lilli VIKSTRÖM kaj mi Anna-Lisa AHLRÉN triope daŭrigis la kunestadon en Germanio, i.a. en Kolonjo, kie ni serĉis kaj trovis la loĝejon de nia konata Paul HÜBNER. Tiu renkontiĝo estas al ni tri de tre kara memoro. Ni tri estas feliĉaj ke ni povis renkontiĝi kaj interbabilu dum iu horo. Poste li skribis en letero ke ankaŭ por il estis memorinda kunestado.

Post nia vizito, revenintaj al la ĝardeno apud la maljunulejo, kie li loĝis, mi subite ekploris, jes ploreĝis. Lilli kaj Maria alrigardis min tre surprizitaj. Pro kio plori? Ĉu mi ne estas kontenta? Ĉu ne estis agrabla renkontiĝo? Jes, la renkontiĝo estis vere agrabla, sed la medio en kiu li loĝis... Kvar viroj kune loĝis, en ne tro granda ĉambro. Ĉiu viro havis tableton apud la lito, unu malgrandan kaj unu iom pli grandan ŝrankon por iom da vestoj. Estis ĉio.

Tre dolorigis min ke tiu maljuna, inteligenta, ĉarma viro devis loĝi tiel triste. Nu, Paul HÜBNER kaj mi post tiu renkontiĝo komencis interŝanĝi leterojn kaj fotojn, li pri siaj familianoj kaj mi de nia stokholma vivo. Mi pensas ke unu al tiuj leteroj povas esti interesa ankaŭ por aliaj KELI-anoj kaj, do, jen mi reskribas ĝin.

„Köln 26.2.1969.

Mia kara fratino Anna-Lisa

Antaŭ mi kuŝas via longa bela letero, kies respondo mi ĝis nun prokrastis. Sed mi ne uzas mian skribmaŝinon, ĉar ĝi estas tro peza por mia malkreskanta forto.

Nun mi volas fine plenumi mian promeson skribi al vi ion pri la komenco de nia organo „*Dia Regno*”. Antaŭ mi kuŝas la libro „*Nia Historio*”. Sur la paĝo 8 vi trovos la bildon de la komenco.

Mi precize memoras la pensojn, kiuj naskiĝis en mia cerbo. Plenaj de zorgoj! Ĉu mi povus surprizi la taskojn, mi demandis min. Ĵeti la zorgojn al Dio? Kaj mi matene genuis en mia ĉambro antaŭ la persona Dio. Ĉion mi diris al li! Nun helpu al mi! Mi nepre bezonas tujan helpon, Via respondo devas esti **tute klara**. Sekrete mi estis scivola, ĉu Dio tion povus fari? Kaj senĝene mi foriris al mia taglaboro. Survoje renkontis mi la leterportiston. Li donis al mi leteron de samideano. En la vagonaro, kiun mi devis uzi, mi malfermis la leteron. Je mia granda surprizo elfalis multaj neuzitaj letermarkoj kaj en la letero mi legis je mia pli grande miro: **Jen tri markoj por la komenco de la Esperanto-organo**. Preskaŭ mi falis sur la genuoj en la vagonaro. Ho, mia Dio, kiel granda vi estas!! Ĉu la precizeco de la responda povus esti pli klara!!!!?

Nun la organo ekzistas pli ol 60 jarojn. Kiom da malfacilaĵoj ĝi venkis dum tiu tempo, monmanko, militoj, kontraŭagoj (speciale de HITLER). Kiom da Esperanto-organoj dum tiu tempo malaperis!!

Kore salutas vin ĉiuj
via Paul HÜBNER”

Jes, tio ĉi estas interesa historio de la vera vivo, ĉu ne? Mia edzo Åke kaj mi Anna-Lisa volas saluti al ĉiuj niaj geamikoj diverslande kaj deziri ĉion bonan por nova jarmilo.

Anna-Lisa kaj Åke AHLRÉN
Kista, Stockholm, decembro 1999

NOVA VESTO, NOVA REVUO? VIA REVUO!

Ĉu pro la vesto oni estas monaĥo?

Ni jam alvenas al la tria numero de *Dia Regno* en la nova vesto. Ni ricevis eĥojn pozitivajn, kuraĝigajn. El tio ni ricevas certe pli da kuraĝo por antaŭeniri. Kiam ni, en Gliwice, planis tiun ĉi ŝanĝon, ni volis eviti diversajn malfacilaĵojn, ĉefe la sendkostojn, sed ankaŭ la prezenton de nia revuo, apenaŭ serioze prezentbla antaŭ ekstera publiko.

Ŝajne, laŭ viaj reagoj, tiu dua celo estas atingita. Nun restas via parto efektive prezenti ĝin ĉirkaŭ vi. Proponu la ricevadon de senpaga numero al diversaj kristanaj bibliotekoj ekzemple, kaj indiku tion al la kasisto.

Pri la alia, mona celo, ni vidos fine de la jaro.

Por ke la revuo fariĝu pli „enhava”, ni bezonas vian kunlaboron. Jam en la antaŭa formo, mi petis plurfoje artikolojn, informojn. Mi eĉ indikis konsilojn. Mi ricevis de pluraj efektivajn kontribuojn. Mi ege dankas, ankaŭ nome de niaj legantoj. Ju pli estus, des pli bone. Kaj mi esperas (esperis?) ke tiu nova vesto kuraĝigos, incitos al verkado.

Nune, ni havas revuon, kiu havas en ebleco plurajn direktojn, al la ekstero kaj al la interno de nia ligo, de nia movado. Ni devas forgesi nek unu, nek la alian direkton. Ĝi devas esti elmonro de nia vivo, kaj ankaŭ elmonro de nia kapablo.

Jam en la pasintaj jaroj, kaj specife en la tri unuaj numeroj, vi povis konstati pri kio temis nia revuo: teologio, kristana vivo, kaj ankaŭ esperanto, esperantismo, esperanta kulturo, kaj ankaŭ la vivo de nia ligo, de nia „familio”. Tiujn aferojn ni planas ankoraŭ enmeti en la revuon. Mi atendas viajn kontribuojn. Daŭre.

Mi volas rememorigi al vi kion mi deziras ricevi:

— de la teologoj, profesiaj aŭ ne:

20 riprensojn, komentojn pri aktualaĵo,

pri biblia teksto, recenzojn pri legita libro, artikolo, pri aŭskultata prelego, informojn pri la rezultoj de esploroj;

— de la kristanoj pli ĝenerale: spertojn, impresojn, pri la vivo, ktp.;

— de la esperantistoj: movadajn, kulturajn impresojn kaj spertojn, rakontojn.

Vi ankaŭ povas mem intervui interesajn personojn ĉirkaŭ vi, kaj traduki tion en Esperanton.

Tamen, mi denove diras, ripetas: evitu la tradukojn de jam pretaj artikoloj, aperintaj en gazetoj. La escepto estas tiuj gazetoj kies celo estas ĝuste esti fonto, kvazaŭ informagentejo (ofte oni indikas la neprecon de la fontindiko). Informo estas komplete libera, sed redaktado apartenas al la aŭtoro (kaj bedaŭrinde en kelkaj ŝtatoj ankaŭ al la eldonisto). Do eblas verki mem pri legita informo, sed oni evitu la tradukadon. Krome, mi devas aldoni, laŭ sperto, ke tradukado kondukas al pli da lingvaj eraroj ol la rekta verkado, por tendenco al servuta redono.

Ĉar tio povas ŝajni malfacila afero, mi denove indikos kelkajn principojn por verki diverstipajn kontribuojn.

Vi ĵus legis tre interesan artikolon, aŭ aŭskultis prelegon, aŭ spektis televidelsendon, kaj vi pensas: „Tamen, estus interese, ke tio troviĝu en *Dia Regno*”. Post enkonduka frazo, kiu prezentas la intereson de la temo aŭ la okazaĵon, aŭ anekdoteton, vi povas prezenti la aŭtoron de la referencaĵo, poste prezenti la pritraktitan temon, kaj la tezon de la aŭtoro. Fine viaj propraj impresoj kaj kompreno finus la artikol(et)on por nia revuo.

Fakte, se temas pri libro (ke la libro ne estas en Esperanto ne tre gravas), aŭ kino-filmo, vi povus agi same.

Se vi mem estas esploristo, aŭ preleganto, mi ne bezonas indiki konsilojn, krom tiun ke, kiam vi produktas ion en via lingvo, ne forgesu verki, eĉ kondense, en Esperanto

por *Dia Regno*. Eble, poste, vi unue verkos Esperantlingve.

Kiam vi volas redoni informon, ne forgesu respondi, se vi povas, la kutimajn demandojn: kiu, kio, kie, kiam, kial, kiom, kiel.

Certe ekzistas en via lingvo diversaj libroj por helpi al redaktado. Ne neglektu ilin. Ili certe povas esti utilaj. En Esperanto ekzistas: *Manlibro pri ĵurnalismo* de Judith JUNGER kaj Stefan MAUL; ankaŭ kelkaj partoj en *Retoriko* de Ivo LAPENNA; ankaŭ *Esprimo de sentoj en Esperanto* de Edmond PRIVAT; kelkaj partoj en *Lingvo stilo formo* de Kalman KALOCSAY; ideoj en *Enkonduko al literatura kritiko* de Giorgio SILFER.

Do, nun, ek al la laboro.

Mi planas por la venontaj numeroj temojn. Komprenoble, se nenio alvenas pri ili, la numeroj estos aliaj. Jen ili: por julio-aŭgusto: *korpo, sporto*, por septembro-oktobro: la kongresa numero, kun la kongresaj tekstoj, por novembro-decembro: *morto kaj vivo*.

Ĝis baldaŭ!

Philippe COUSSON

TAGORDO DE LA JARKUNVENO DE KELI

1. **Malfermo.**
2. **Elekto de kunprotokolantoj.**
3. **Funebra memorigo.**
4. **Sekretaria jarraporto.**
5. **Kasista jarraporto.**
6. **Raporto de la kaskontrolantoj.**
7. **Buĝetoj.**
8. **Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*.**
9. **Esperanto-Misio.**
10. **Estrarelekto:** Ĉijare finiĝas la deĵorperiodo de Adolf BURKHARDT, Philippe COUSSON, Éva FARKAS, Arne LUNDKVIST, David FEATHERSTONE. Adolf BURKHARDT ne plu kandidatas kiel prezidanto de KELI sed li pretas resti membro de la estraro speciale por la ekumena laboro. Arne LUNDKVIST ne plu kandidatas kaj ne estas posteulo. David FEATHERSTONE estas provizore reelektebla sed ni estas serĉantaj posteulon.
11. **Kongresaj planoj.** En 2001 okazos Ekumena Kongreso en Zagreb kaj pri 2002 ni devas diskuti.
12. **Ideoj kaj sugestoj de la membroj.**
13. **Fermo.**

Els VAN DIJK

Finlingve verkis Pia PERKIÖ
Tradukis Anja KARKIAINEN
(kun permeso de la aŭtorino)

RIGARDU BELMATENON!

(Oi katso, mikä aamu!)

Rigardu belmatenon! Ne ombroj noktaj plu!

La birdoj eĉ plej etaj dankadas al Jesu'.
Ho, vidu perfektecon de l' Dia krelabor'!
Rigardu belmatenon! La nokto estas for!
Rigardu belmatenon! Rerajtas vi, fidant',
laŭiri la vojeton mallarĝan de l' Savant'
kaj peti difavoron preĝante ankaŭ nun.
Rigardu belmatenon! Jen nova oportun'!
Rigardu belmatenon! Al Di' pro lia far'
sonegos iam laŭdo de nova kreitar'.
Vizaĝon de Jesuo ekvidos la okul',
rigardos belmatenon ĉe l' tron' de l' Eternul'!

NEKROLOGOJ EL ĈEĤIO

La 28-an de januaro 2000 mortis en Prago en la ago de 45 jaroj Mgr. Stanislava CHRDLÓVÁ, membrino de nia sekcio, ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj edzino de D-ro Petr CHRDLÉ, estrarano de UEA. La lasta adiaŭo okazis vendrede 11. 2. 2000 en Prago en la preĝejo de St. Nikolao (Ĉeĥoslovaka Husana eklezio) kaj partoprenis ĝin esperantistoj el nia tuta lando kaj el Germanio, Italio kaj Danlando. En la nomo de UEA oficiale adiaŭis vicprezidanto de UEA Renato CORSETTI.

Estraranino de ĉeĥa KELI sekcio, d-rino Libuše BLÁHOVÁ, mortis en Prago la 12-an de februaro en la ago de 79 jaroj.

Pavel POLNICKÝ 

NEKROLOGO DE JANTINA LAURENTIA PUTTO (TINI)

Je la 18-a de majo 2000 mortis nia kara membrino de KUNE kaj KELI, Tini PUTTO en la aĝo de 93 jaroj. La diservo okazis merkrede, la 24-an de majo en ŝia maljunular-domo „Tusserlerhof” kaj la enterigo estis en Nova Tombejo ankaŭ en Lochem je la 15-a horo. La evangelia luterana pastoro J. BRAS el Zutphen gvidis la diservon kaj parolis ĉe ŝia tombo.

Sur la funebra sciigo estis skribita en Esperanto; „Ŝi havis puran animon”. Ankaŭ en la diservo la pastoro en la komenco parolis Esperante. Li diris: „Estimataj ĉeestantoj. Ĉiu el vi, legis same kiel la forpasintino kun multaj homoj el la tuta mondo, ni kore bonvenigas”.

En la parolado li i.a. menciis, ke ŝi estis estraranino de Kristanaj organizoj kaj vizitis multajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Ŝi havis adresojn de la tuta mondo en sia adresaro.

Li legis el la evangelio de Mateo: ĉapitron 5, versiklojn 11-16.

Ĉe la tombo mi parolis nome de la Esperantaj organizoj kaj fine mi diris: „Vivu en paco, Tini”. Estis emocia travivaĝo! Ĉeestis sufiĉe da parencoj, konatoj kaj 2 Esperantistoj.

Fine ni preĝis kune: „Patro Nia”.

Gerda DERCKS

Je Kristnasko 1999, nia samideanino kaj fratino Éva havis la doloron perdi la edzon **Jozsef FARKAS**. Ni ĉiuj sentas la gravon de la perdo, por ŝi, por la Reformita Eklezio en Hungario, por lia budapeŝta paroĥo, kaj ankaŭ por ni, kaj por ĉiuj tiuj kiuj jam renkontis lin.

P.C.

Poemo de Shorty

Tini Putto

Kuraĝega kaj afabla,
Ĉiam tre serena;
Diligenta kaj talenta,
Amikino vera.
Malavara, sindonanta,
Tre amata kaj amanta,
Malgraŭ ĝeno, eĉ ridanta,
Ĉarma kaj sincera.

Instruisto pacienca,
Saĝa kaj helpema;
Alde kantis kun la ĥoro
Ĝoje, dum kongresoj.
Simpatia en doloro,
En aflikto aŭ malĝojo,
Ĉiam preta kun konsolo-
Nia kara Tini!

Shorty

Forpaso de Episkopo Wl. Miziolek

Estimataj kaj Karaj,
ĵus atingis nin tre aflikta informo, ke hieraŭ, te. la 12-an de majo (vendrede) en la varsovia hospitalo mortis, havante 85-jarojn pastro Episkopo, Wladyslaw Miziolek. Jam de longa tempo pastro Episkopo estadis dum tiel nomataj kontrolvizitoj en hospitalo.

Kore via, Barbara PIETRZAK

Deziras korespondi

Mi foje ricevas korespondpetojn, ĉar, mi ne scias kiel, mia adreso aperas en diversaj revuoj. Tiujn adresojn mi transdonas al vi, esperante ke almenaŭ unu respondos al petinto. Ĉi-foje, la peto venas de kubanino, komencantino.

Yadixi Quintana Rojas, Carretera Jicotea Km 8, La Chell, San Diego del Valle, Citu-entes V/C, CP 54460, Kubo.

Krucvortenigmo

1		2	3	4	5		6
		7					
8	9		10			11	
12		13			14		
15				16			
17				18			
19			20			21	
		22			23		
24							

Kromsolvo

8	9	16	7	14	6	15
---	---	----	---	----	---	----

horizontale: 1. graco, 7. marerinac', 8. prefikso malestima, 10. sur vjetnama aŭto, 11. rilatiga prepozicio, 12. viro post nupto, 14. deviz', 15. reklamil-lumo, 17. ne mal-san', 18. inorgan', 19. moviĝ', 20. prefikso, 21. plurala pronomo, 22. homverka belesprima maniero, 24. apotekaj laboratorioj

vertikale: 1. malofensivo, 2. kemia simbolo de fero, 3. likvaĵoj, 4. alkohola trinkaj', 5. deriva sufikso, 6. religiaj muzikverkoj, 9. ideologi', 11. lud' kun tabuletoj, 13. stri' ĉirkaŭ talio, 14. afazi', 16. batali sen armiloj, 20. utila mineral', 23. kiel 5.

kromsolvo: Epistolo de la apostolo Paŭlo.

Fritz LAUTENBACH

Solvo de la silaba krucvortenigmo 821

horizontale: 1. koncilio, 4. durega, 7. feo, 8. voki, 9. lile, 10. sonore, 12. liturgio, 13. nehuman', 15. opi', 16. garaĝa, 17. monato, 18. romaniko.

vertikale: 1. konfeso, 2. Ciono, 3. ovo, 5. religio, 6. galeopiteko, 11. renegato, 14. hura.

kromsolvo: konsoli.

Ni kore bonvenigas novajn DR-abonantojn kaj KELI-membrojn en 1999/2000.

La bonvenigo estas ĝojiga informo por mi. Sed tio ja nur estas unu flanko de la monero. KELI kaj DR perdas ankaŭ homojn: pro morto, maljuneco, eble pro kotizaltigo, eble pro ne sufiĉe interesa gazeto, eble pro... multaj aliaj kazoj, kiujn mi ne konas. Sed ni ĉiuj estas KELI. Ni povas partopreni la kongresojn kaj ni povas/devas kontribui al interesa kaj leginda DR. KELI estas tradicia kaj ligas kristanojn tutmondajn per Esperanto, kaj la agado „Evidente” de nia kara frato Jacques Tuinder malfermas niajn okulojn por la nenecesa blindeco en la mondo, certe ankaŭ ne hazarde en la senco de la okulkuracisto Zamenhof.

Do, bonvenon al: Christine KOPYTEK, DE; Julio Marin PERÉZ, ES; Ernst LEUZE,

DE; Rodrigo Fallador PRADO, BR; Vasil PI-STOLI, AL; Margaret WILTON, GB; Leomar B. BITTENCOURT, BR; Antonio G. FERNANDEZ, US; Helvi SILVENNOINEN, FI; Michael CAYLEY, GB; Luis E.A. LOPÉZ, CO; Louis Bernard BAUD, FR; Nils Alvar EKSTÉN, SE; Heinrich RABENSTEIN, DE; Yoan F.C. PERÉZ, CU; Ingeborg SCHUTZ, DE; L.M. Hernández YZAL, ES; SAYA TOLA David Richard, AO; Donald R. MACHEN, US; Elley Marie LUNGQUIST, SE; Stephen J. BACKHOUSE, GB; Kerttu EKMAN, FI; Zdzislaw GLAJCAR, PL; Rainer HAUPT, DE; Martin GESTRICH, DE; Martin THORENZ, DE; Stefan SASSENBERG, DE; Tanjo PETRENKO, BY; Ingrid VOß, DE;

Salutas vin ĉiuj la KELI-kasisto kaj matrikulisto

Siegfried KRÜGER

LA KELI-KONGRESO EN JÁNSKÉ LÁZNĚ (CZ) JAM ANTAŬ LA PORDO

La ĉijara KELI-kongreso (2000-08-05/12) okazos en bela montara regiono de majesta Krkonoŝe-montaro (la plej alta monto 1602 m) ĉe la limo kun Pollando. La urbeto mem, Jánské Lázně estas bela banloko, kie oni kuracas precipe paralizon kaj en kiu ankaŭ troviĝas konvena bone ekipita evangelika ripozejo, kiu fariĝos por unu semajna kongresejo.

Krom la riĉa kongresa programo oni havos ŝancon ankaŭ ekkoni la belan pejzaĝon de la regiono kaj ĝiajn vidindaĵojn.

Por tiuj, kiuj disponas pri pli da tempo nepre rekomendindas post la kongreso rezervi al si almenaŭ iom da tagoj por resti en la ĉefurbo de Ĉeĥio, Prago, por povi ĝui belecon de la urbo, kiu prave estas konsiderata unu el la plej belaj en la mondo. Al ĝia plej konata triopo de altiraĵoj sendube apartenas Praga kastelo kun gotika katedralo de Sankta Vitao (katolika), la ponto de Karolo la 4-a, la impona subĉiela ekspozicio de 30 barokaj statuoj kaj statuaroj, kaj la Malnovurba urbodomo kun mondkonata mezepoka astronomia murhorloĝo, kies kreinto estis laŭlegende blindigita por ne povi konstrui similan miraklon ankaŭ aliloke.

Sed tiuj, kiuj restos, vidos krom tiuj allogaĵoj ankaŭ aliajn precipe religiajn juvelojn de praga arkitekturo, inter alie la barokstilan preĝejon de Sankta Nikolao sur Malnovurba placo (Ĉeĥoslovaka husana eklezio), la preĝejon de Sanktaj Cirilo kaj Metodo (Ortodoksa eklezio), la preĝejon de Sankta Marteno en muro (Evangelika eklezio) kaj kapelon de Betlehemo, kie predikis Majstro de Praga universitato kaj konata reformisto Jan HUS (bruligita en 1415) – kaj pliajn lokojn laŭ intereso kaj improvizita elekto.

Sed Ĉeĥio ne estas nur Prago kaj montaro Krkonoŝe. Tre alloga estas triangulo de la plej famaj ĉeĥaj banlokoj Karlovy Vary – Mariánské Lázně – Františkov-


vy Lázně ankaŭ bone atingeblaj de Prago dum unu tago, same kiel plejparto de historiaĵoj protektitaj de UNESCO, ekzemple Kutna Hora, Cesky Krumlov, Telc, Holasovice (vilaĝa biena baroko) kaj pluraj aliaj.

Ne necesas antaŭaliĝi nek pagi ajnan kotizon por tiu proponata plilongigo de la restado en Ĉeĥio, la unuan tagon de la kongreso sufiĉos aliĝi ĉe mi por povi rezervi la tranokton en iu de la disponeblaj hoteloj kaj pensionoj kaj ĉiuj pagos nur tion, kion oni efektive elektos kaj ĝuos (tranoktojn, enirbiletojn, ekzemple bileton al Nigra teatro, ktp.).

Sed la ĉefa afero estas, ĉu vi ne forgesis aliĝi al la KELI-kongreso. Ne risku malĉeston de brila aranĝo en belega naturo kaj aliĝu tuj ĉe:

Pavel Polnický, Lesní 150/VI,
CZ-290 01 Poděbrady,
tel. +420.615651,
fakso +420.324.610812,
rete: polnicky@iol.cz

Petro CHRDLÉ



*Prago — malnova urbo.
Fotis: E. Jahelka*